# la Espero

1989:3 SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

## Norrköping '89

## Agadplano

## Universitato

## "Espero 89"

## Nova redaktoro

## *Esperantaĵojn deziras:*

Gamir Man Sresta M.A., B.L, advokato, H/682 Tanlaci Tole, ĉa 2/518 Katmandu 3, Nepalo.

La aĵojn li deziras por vigligi la esperantovivon en Nepalo.

## *Korespondi deziras:*

**Lech Grochulski**, PL-42-206 Czestochowa, ul. Zarecka 54/155, Pollando.

40-jara, interesiĝas pri filatelio k.a.

**Vygante Milaŝiute**, str. Didlaŭkio 9-9, SU-232057 Vilnius, Litovio (USSR).

13-jara, volas korespondi pri kio ajn.

**Stanislaw Broniewski**, Stalingradzka 20 m. 112, PL-03-468 Warszawa, Pollando.

**Jiri Opoĉenski**, Horská 439, CS-54302 Vrchlabí 4, Ĉeĥoslovakio.

25-jara, interesiĝas pri sporto, muziko, fotografio, arto.

**Marek Warmuz**, os. Bohaterów Wrz. 59/52, PL-31-621 Kraków, Pollando.

30-jara, interesiĝas pri filatelio, turismo, geografio.

**Mariola Katerina Starczewska**, str. Bohaterów 29, PL-89-333 Osiek N/Not.

24-jara, interesiĝas pri familia vivo kaj Svedio.


**INTERNACIA KORESPONDA SERVO**

helpos al vi trovi korespondanton/-inon, amikon/-inon aŭ partneron/-inon.
Por pluraj informoj sendu unu internacian respondkuponon al
Box 163 Stn. "A"
DOWNSVIEW,
Ont M3M 3A3
Kanado



# La Espero

## *Organ för Svenska Esperantoförbundet*

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08–11 74 34
**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm
**Redaktör:** Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31
**Sättning:** Per Aarne Fritzon
**Utformning:** Omnibus/Franko Luin
**Tryck:** EsperantoCentro, Stockholm 1989


# Esperantoförbundet

**Adress:** EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08–11 74 34
**Öppettider:** måndag – fredag kl. 10.00 – 14.00; vintertid måndag – torsdag även 17.30 – 19. Ring före besök!
**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet
**Medlemsavgift 1989:** Direktansluten medlem 125 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr. Ungdomsmedlem 50 kr.
**Enbart prenumeration:** 125 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 65 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

# SEFs styrelse

**Ordförande:** Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31 (La Espero, nordiskt samarbete)
**Vice ordförande:** Märtha Andréasson, Tolsered Pl. 2265, 425 90 Hisings Kärra, tel. 031–57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)
**Sekreterare:** Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08–712 82 91 (kansliet, massmedier)
**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500–12205 (massmedier)
**Styrelseledamot:** Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby, tel. 0491–20461 (turnéer, bibliotek)
**Styrelseledamot:** Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415–501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)
**Styrelseledamot:** Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011–16 26 87 (intern.org.)
**Suppleant:** Per Aarne Fritzon, Möregatan 9, II, 11627 Stockholm, tel. 08 – 408892
**Suppleant:** Leif Nordenstorm, Studentvägen 36, L:51, 75234 Uppsala tel. 018 – 153362
**Informationskommittén:** Bernt Lindquist, Västermovägen 19, 732 49 Arboga, tel. 0589–155 31.

# Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö
Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö
Telefon: 040–12 20 29
Postgiro: 578–5
Öppettider: 1 september – 15 maj: onsdagar 10 – 11, torsdagar 17 – 18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.
Expedition: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Uppsala.

ISSN 0014–0694
JUNIO 1989
77-A JARKOLEKTO
FONDITA EN 1913

# la Espero

## Enhavo

36 Gaja, labora kongreso kun internacia etoso
38 La tagoj ne sufiĉis por ĉiuj kongresaj eventoj
39 Ingemar eksiĝis 47439,26 gajno de la loterio
40 Pli da membroj kaj pli bona ekonomio
41 Finvortoj pri 1988
42 Ekonomisk rapport för år 1988
43 Kiel Paŭlo Lengyel helpis d-ron K.B. Wiklund
Nekrologo: Bertil Åkerberg mortis, 76-jara
44 Nova Verdstela Internacia Universitato
45 Letero de Academia Sinica
46 TRA LA LANDO:
Barn- och ungdomsträff i Närke i oktober
Drottning Silvia
47 TRA LA MONDO:
16-semajnaj kursoj en norvega popolaltlernejo
Fabela filmo el Pollando
Bonvenon al Latvio
Konkursa alvoko
Invito al Ustka
Someraj Tagoj
48 Kontrolu vian adreson!
Ĉu ĉio en ordo?
Esperanto en la radio!

*Ĉiuj kongresbildoj el Norrköping estas faritaj de Bernt Lindquist.*

## Prezidanto:

### Nova redaktoro de La Espero



Ek de la venonta numero, n-ro 4, Leif Nordenstorm estos nova redaktoro de nia membra gazeto *La Espero*.


Tiu ĉi numero do estas la lasta redaktita de mi. Kvankam mi certe kelkfoje sentos mankon de tiu redakta laboro, ankaŭ estas faciliĝo, ĉar mi nun pli povos okupiĝi pri la prezidantaj taskoj. Ambaŭ, prezidanta kaj redakta taskoj, estas tro multe por persono kiu havas ankaŭ tuttagan laboron, tion mi ofte konstatis dum la lasta tempo.

Mi esperas, ke mi estonte povos agi pli aktive kiel prezidanto. Se oni rigardas la agadplanon por la venontaj jaroj, ne mankos laboro por mi kaj la ceteraj estraranoj.

Mi volas danki ĉiujn kunlaborantojn en la redakcio, kaj mi ankaŭ volas danki tiujn, kiuj tiel diligente sendis artikolojn kaj informojn al la gazeto. Ne ĉiuj manuskriptoj estis presitaj, aŭ pro manko de loko aŭ ĉar ili ne konvenis en membra gazeto. Mia principo por la enhavo de *La Espero* estis, ke ĝi informu pri Esperanto en- kaj eksterlande, informu pri kio okazis kaj okazos en la Esperantomovado, precipe en Svedio.

Mi admonas vin same diligente sendi materialon al mia sekvanto, Leif.

**Karin Lindquist**



Leif Nordenstorm estos redaktoro por *La Espero* ek de venonta numero – n-ro 4.

Leif estas tre taŭga por tiu tasko, ĉar li dum longa tempo redaktis la membran gazeton de TEJO, *Kontakto*.

Ek de nun la manuskriptadreso estas:

*Leif Nordenstorm*
*Studentvägen 36 L:51*
*75234 UPPSALA*

# Gaja, labora kongreso kun internacia etoso

La sabatan tagmezon la 22-an de aprilo, la fama sonorilaro de la urbodoma turo en Norrköping sesfoje ludis la esperantistan himnon. Ankaŭ en multaj aliaj manieroj la urbo estis atentigita pri la kolektiĝo de 142 esperantistoj el Svedio, Finnlando, Latvio, Pollando kaj Hungario.

La "homoj sur la strato" bone sciis pri nia kongreso dank' al grandaj artikoloj en en la gazeto Norrköpings tidningar. La komunumo – kaj la studasocio NBV – malavare kontribuis ekonomie, kaj la komunuma estro ("kommunalrådet"), Kjell Norberg, partoprenis grandan parton de la kongreso.

Enhavoriĉa estis nia 83-a SEF-kongreso. Al vere internacia etoso kunhelpis pleje du polaj gastoj. Same kiel en Sundsvall pasintjare la lerta aktorino Jadwiga Gibczynska ludis grandiozan teatraĵon. La gvidanto de la Esperanto-elsendoj de la pola radio, Andreo Pettyn, ne nur prelegis, sed ankaŭ havis tempon sonbendigi la kongreson por sia radio.

Ĝojigaj estis kelkaj informoj dum la jarkunveno. Sed permesu, ke ni trarigardas la konferencon detale de la komenco.

## Gaja interkona

Kongrespartoprenontoj, kiuj alvenis jam vendrede por ĉeesti la interkonan vesperon, ĝuis tre amikan atmosferon en la Popola Domo – la kongresejo, en kiu ĉiuj kongresaj eventoj okazis.

Inter ĉiuj gajaj konversacioj estis ankaŭ tempo aŭskulti al Andreo Pettyn, kiu parolis pri 30-jara Esperanto-elsendado en Radio Varsovio, kaj al Anita Lindblom pri ŝia esperantista agado en Tanzanio. Kluba koruso kantis kaj klopodis kantigi ĉiujn ĉeestantojn.

## Kvinan fojon en Norrköping

La sabatan matenon uzis la fervojistoj, instruistoj, junularo kaj eldonsocietaj interesuloj por siaj kunvenoj




Digne solena estis vere la oficiala malfermo de la kongreso en la granda salono. La prezidanto de la aranĝanta klubo, Haldo Vedin, konstatis ke estas la kvina SEF-kongreso en Norrköping, aranĝata de la nun 60-jara klubo. Li esprimis sian ĝojon vidi gastojn el tri amikurboj de Norrköping, nome Tampere en Finnlando, Riga en Latvio kaj Miskolc en Hungario.

La koruso "Natividad" bele kantis – nian himnon eĉ en tiel klara lingvo, ke nia SEF-prezidanto Karin Lindquist petis la koruson daŭrigi la ekzercadon de Esperantokantoj.

## Sven Jerring fondis klubon

Karin Lindquist en sia malferma parolado speciale salutis la amikurbajn gastojn, la komunuman estron Kjell Norberg, la reprezentantojn de la UN-klubo kaj NBV, Lars Lindskog kaj Alf Karlsson, la polajn gastojn Jadwiga Gibczynska kaj kaj Andreo Pettyn kaj la finnlandan reprezentanton Jukka Laaksonen kun edzino. Ŝi ankaŭ gratulis la 60-jaran klubon en Norrköping.

– Mi bonvensalutas... komencis Kjell Norberg, "kommunalråd" en Norrköping, sian salutparoladon en bona Esperanto. Jam en 1912 fakte ekzistis Esperantoklubo en Norrköping, li rakontis. Sven Jerring estis unu el la fondintoj. Kjell Norberg post prezentado de la urbo transdonis urban standardon al la klubo. Standardon donis ankaŭ Jukka Laaksonen kiel reprezentanto de la finnlanda asocio kaj ĝemela klubo.

Andreo Pettyn parolis pri la pola asocio kaj la pola radio, Pal Zaletnyik por la hungara amikurbo Miskolc, Zigfrid Polaks por la esperantistoj en Riga, Bertil Andreasson por ILO, Leif Nordenstorm por KELI, Stig Carlsson por la fervojista organizo, Alf Karlsson por NBV kaj Lars Lindskog por la UN-klubo.

## Membraro nun kreskas

Tempo por la jarkunveno de SEF! Karin Lindquist substrekis kiamaniere stokholmanoj per idealista laboro sukcesas funkciigi la Esperanto-Centron, kaj kiamaniere Lennart Svensson en Filipstad povas fortigi la SEF-kason dank' al sia granda loteria laboro. Aplaŭdoj!

Roland Lindblom estis elektita

studplanoj estis transdonita al la dimanĉa diskuthoro pri instruado.

## Honora membro

Antaŭ ol la jarkunveno transiris al la nova agadplano, venis kara honorigo de veterano Nils Johansson en Norrköping. Li estis nomita honora membro de SEF. Dum 30 jaroj li estis kluba prezidanto, apartenis al la SEF-estraro kaj nun verkis kluban historion kvankam li estas blinda.

## 70 studis en Karlskoga

Dum la pristudado de la agadplano, malkovriĝis ke Karin Lindquist kaj Lars Forsman sukcesis dum vizito ĉe la eduk-radio veki ĝian intereson por Esperanto. Finfine oni povas havi esperon pri Esperanto-programeroj en la radio – eble eĉ en la televido.



*Gastoj de la kongreso estis Bertil Forsman, la ĉefo de "Vetandets värld" ĉe la Sveda radio, kun edzino Birgitta, ĉi tie kun Lars Forsman, instruisto ĉe Karlskoga Folkhögskola.*

gvidi la jarkunvenon kaj lerte faris tion kun Lisbeth Andreasson kiel sekretario. Rapide sed tamen zorge la estrara raporto estis trastudita kaj aprobita.

Notindaj en ĝi estis la faktoj, ke la membraro kreskis per 68 ĝis 1.361 kaj ke multjara deficito en la ekonomia raporto turniĝis al profito, eĉ je pli ol 30.000. Membrokotizo do povas resti senŝanĝa.

Karin Lindquist estis reelektita prezidanto de SEF. La tri estraranoj, kies mandatoj finiĝis, Kerstin Rohdin, Börje Andersson kaj Bertil Andreasson, ankaŭ reelektiĝis. Anstataŭanto Ingemar Nordin tamen rezignis, kaj en lian postenon venis Per Aarne Fritzon, ankaŭ el Stokholmo. La revizoroj Bertil Bengtsson kaj Åke Blomberg reelektiĝis.

## Kvar proponoj el Väsby

"Esperanto en Väsby" sendis kvar proponojn al la jarkunveno. La unua pritraktis enmigrintojn kaj la eblecojn esperantigi ilin. La jarkunveno decidis, ke SEF esploru la intereson por Esperantokursoj inter ili.

La dua Väsby-propono pledis pri pli aktiva varbado de instruistoj. Dank' al la testamento de Ragnar Hjorth, 10.000 kronoj nun estas je dispono i.a. por stipendioj en ekzemple la popolaltlernejo en Karlskoga.

Trie Väsby volis havi alian Esperanto-Centron ol la nuna. Ne estas multaj eblecoj nun efektivigi tion, sed la estraro tamen klopodu trovi novan ejon.

Kvare Väsby havis kelkajn opiniojn pri la SEF-loterio. La estraro pristudos tion, sed Lennart Svensson substrekis, ke pli malgranda lotprezo ol 20 kronoj ne eblas, se oni vere volas havi profiton.

Propono de Kaisa Hansen pri


**Esperanto-tago la 2-an de septembro**

Faru el tiu tago manifestacion por Esperanto en la tuta lando. Aranĝu ekspoziciojn, kursojn, prelegojn, demonstraciojn... Uzu la fantazion!

Planu kaj preparu vin jam nun – kiel vi scias, la someraj tagoj ofte estas mallaborema tempo.

Bonan sukceson!




*Andrzej Pettyn de Pola radio*

Lars Forsman raportis pri la kursoj en Karlskoga. Ĝis nun 70 personoj studis Esperanton en la popolaltlernejo. 5–6 eĉ fariĝis instruistoj hejme!

La agadplano antaŭvidas agadon inter instruistoj, informojn al eksteraj instancoj, plifortigon de kluboj, apogon al SEJU kaj plifortigon de la ekonomio.

Fine de la jarkunveno Karin Lindquist dankis al Ingemar Nordin pro lia multjara laboro en la estraro kan en la Esperanto-Centro. Feliĉe Ingemar promesis daŭre kunhelpi. Libro kaj floroj estis malgranda dankdonaco por grandega laboro.

– Iru hejmen kaj laboru! estis la prezidantaj finvortoj al la jarkunvenaj partoprenintoj.

**Börje Andersson**

# La tagoj ne sufiĉis por ĉiuj kongresaj eventoj

Kiel kutime la Esperanto-kongreso estis ne nur jarkunveno kaj laboroj. La tuta sabata vespero kaj eĉ nokto estis rezervita por diversspecaj eventoj – kaj same la dimanĉo.

Ĉu ni povos sufiĉe mallonge trarigardi ĉion? Ni provu!



*Kjell Norberg, reprezentanto de la urbo Norrköping, provis diri kelkajn vortojn en esperanto. La apalaŭdoj ne mankis!*

Andreo Pettyn prelegis pri lernada strategio. "Kial multaj novaj lernantoj ne fariĝas bonaj esperantistoj?" li demandis. Kaj donis jenajn respondojn:

1) Venas ofte homoj, kiuj ne sukcesis en aliaj lingvoj.

2) Lingvo ĉiam postulas penojn. Ne seniluziigu homojn, promesante ke oni tre rapide povas lerni Esperanton.

3) Atentu la motivojn, kial oni volas lerni Esperanton.

4) Ofte mankas vera strategio por la lernado.



*Jadwiga Gibczynska*

## Mirinda Jadwiga!

La sabatvespera supeo postulis tiom da agrabla tempo, ke la du vesperaj prezentadoj malfruiĝis unu horon. Sed tamen la plej multaj restis kaj ĝuis ĝis la 1-a horo nokte...

Kiam la aŭskultantaro kolektiĝis, Gun Alf kaj Margareta Rönnlund prezentis belan muzikon. Kerstin Rohdin poste enkondukis la aktorinon Jadwiga Gibczynska kaj ŝian teatraĵon pri Zamenhof, rigardata per la okuloj de lia patrino, edzino kaj filino.

Estis mirinde, kiel nuancan bildon de Zamenhof la konata pola aktorino povis doni en sia majstra prezentado.

En tre malfrua nokta horo la trubadoro Roland von Malmborg tentis la aŭskultantaron al grandaj ridoj. Gaja Roland devus esti vere valora ebleco por nia movado – eble tro malmulte utiligata?

## Esperanto-diservo

La tempo por dormi ne fariĝis longa por tiuj, kiuj volis ĉeesti la esperantan diservon en la preĝejo de Hedvig. Leif Nordenstorm predikis, esperanta biblio estis transdonita al la preĝejo kaj monkolekto al malsanuloj en Afriko kaj Hindujo donis 796 kronojn.

## Esperanto en lernejoj

Dum la diskuthoro pri instruado ni notis la jenajn voĉojn:

Bertil Andreasson: En kelkaj lernejoj estas eblecoj elekti Esperanto-studadon. Sed ankoraŭ neniu lernejo kolektis sufiĉe da partoprenantoj.

Lars Forsman: Mi alvokas instruistajn helpantojn por la lernejo en Karlskoga!

Kerstin Rohdin: La lernejoj estas rekomenditaj serĉi kontaktojn kun orientaj landoj. Uzu tiun eblecon...

Bertil Nilsson: Ne atendu, ke instruistoj komencu instrui Esperanton pro idealismaj kialoj.

Krome Åke Rohdin atentigis, ke la lerneja programo de la verdula medi-partio estas favora al Esperanto.

## Libro-aŭkcio donis 1.833 kronojn


Per sia gaja maniero Torsten Lundh kreis unu el la plej popularaj programeroj de la SEF-kongresoj – la libroaŭkciojn. Kvankam estis nur malgranda stoko de libroj kaj mallonga tempo je dispono, la ĉi-jara aŭkcio donis 1.833 kronojn al la SEF-kaso.

## Ĝis Karlskoga!

Restis de la kongreso la fermo kaj la ekskursoj – urba promenado kaj vizito ĉe SMHI.

"LKK faris grandan laboron", konkludis Karin Lindquist dum la ferma kunsido. Gaja etoso regis la tutan tempon.

Alvokitaj al la estrado estis la





*Jen parto de LKK je la fino de la kongreso, sur la podio por ricevi meritit ajn aplaŭdojn de la kongresanoj.*

tuta LKK: Martin Häggström, Sigbritt Söderback, Alf Wernersson, Johan Fransson, Nils Pettersson, Karl Pettersson kaj Haldo Vedin. SEF-vicprezidanto Märtha Andreasson transdonis al ĉiuj librojn.

Fine Haldo Vedin simbole transdonis la flagon al Lars Forsman kiel reprezentanto por la venontjara kongreso en Karlskoga fine de majo.

**Börje Andersson**

# Ingemar eksiĝis



Ingemar Nordin eksiĝis el la estraro de SEF, en kiu li estis ano dum multaj jaroj. Lia laborkapablo kaj lia klereco estis mirindaj, kaj lia valoro por la estraro tial tre granda.

Lia ĉefa tasko estis prizorgi nian Esperanto-Centron kaj li okupis sin pri ĉia laboro tie, ĉu respondeca aŭ rutina.

La tre sukcesa koresponda kurso estas verkita de li. Multaj membroj aliĝis al SEF dank´ al tiu kurso. Kaj laŭ informo, nova lernolibro estas survoje!

Do, feliĉe, li ankoraŭ estas aktiva kaj promesis helpi nin diversmaniere, speciale en EC ankaŭ estonte, kaj ni daŭre rajtas telefoni al li pri esperantaj aferoj.

Ni ĉiuj kore dankas al Ingemar por granda laboro farita kaj farota!

**La estraro**

# Libroj venditaj por 4.500 kronoj

Tre sukcesa estis la vendado de libroj dum la kongreso en Norrköping. La Eldona Societo vendis por proksimume 4.500 kronoj!

Samtempe SEF vendis informmaterialojn por proksimume 300 kronoj.

# 47.493 kronoj kaj 26 oeroj

Tiu sumo estas la gajno de nia landa loterio. Nun ni havas eblecon pli intense informi pri Esperanto. La estraro decidos dum sia unua aŭtuna kunsido, kiamaniere ni uzu la monon kadre de nia agadplano.

Ni volas elkore danki ĉiujn, kiuj kontribuis al la mirinde bona rezulto kaj speciale ni dankas la administranton de la loterio, Lennart Svensson, kiu kun energio kaj inventemo distribuis ĉiujn lotojn.

Laŭ decido de la jarkunsido en Norrköping, ni petos permeson aranĝi novan loterion jam ĉi-aŭtune, kaj ni esperas, ke vi same diligente vendos la novajn lotojn!

**La estraro**

# Pli da membroj kaj pli bona ekonomio

Disvastigi la uzon de la internacia lingvo Esperanto – tio estas la baza celo de la Esperantomovado. Por plenumi tion ni devas labori sur jenaj kampoj:

A. Instrui Esperanton
B. Informi pri Esperanto al ĉiuj eksteraj instancoj
C. Plifortigi la klubojn kaj plinombrigi la membraron
Ĉ. Eldoni membrogazeton
D. Apogi SEJU-n en ĝia junulara Esperantolaboro
E. Kunlabori kun aliaj Esperanto-organizoj en Svedio
G. Plifortigi la ekonomion

## A. Eduko

Esperanto en la lernejo estas celo al kiu ni strebas, kaj ni speciale okupas nin pri tiu demando.

Ĉar SEF testamente ricevis 10.000 kronojn , destinitajn de la testamentinto por laboro inter instruistoj, ni speciale atentas tiun celgrupon. SEF laŭ ebleco volas subteni ankaŭ semajnfinajn aŭ semajnajn kursojn por instruistoj.

*SEF volas agi por*

– ke oni enmetu studerojn pri Esperanto dum lingvistikaj kursoj ĉe universitatoj kaj altlernejoj
– ke Esperanto estu prezentata dum studotagoj por instruistoj
– ke oni ellaboru studoplanojn por la elekteblaj temoj en la supera lerneja stadio, en kiuj enestas Esperanto
– ke oni informu pri Esperanto en diversaj tipoj de lernejoj
– ke okazu kursoj regione kaj loke

*SEF volas subteni*

– per konsiloj kaj helpo pri lernilo kaj pri instruistoj por la menciitaj kursoj
– per materialo por la lerneja informado

Tiuj agadoj okazu en proksima

100 JAROJ DE ESPERANTO EN SVEDIO 1889-1989

kunlaboro kun la sveda sekcio de ILEI kaj la Sveda Esperanto-Instituto.

## B. Informi pri Esperanto al ĉiuj eksteraj instancoj

Fine de 1988 estis kreita Nordia Komisiono kun reprezentantoj el Danio, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio, kun la celo kunlabori i.a. pri informado al eksteraj instancoj. Dum la unua kunsido oni decidis kunlabori kadre de jenaj kvin kampoj:

1. **Landaj UN-asocioj.** Ni aktive kunlaboras kaj partoprenas en la kunsidoj, seminarioj ktp de la UN-asocioj, ekz. prelegante pri Esperanto, kaj proponante al iliaj jarkunvenoj, ke ili akceptu Esperanton en iu formo.

2. **Internaciaj infanvilaĝoj.** Ni skribas al CISV kaj petas ilian subvencion kaj subtenon por esperantista infanvilaĝo en Nordio.

3. **Amnestio Internacia.** Ni sendas rezolucion en Esperanto kaj en nacia lingvo, ke ili eksciu, diskutu kaj lernu Esperanton. Ni ankaŭ admonas Esperantoklubojn informi al lokaj Amnestio-grupoj pri Esperanto.

4. **Parlamentanoj.** Ni invitas la landajn kulturajn ministrojn al Brajtono venontsomere. La celo estas montri al ili la praktikan uzadon de Esperanto. Ni regule informas la parlamentanojn pri novaĵoj en la Esperantomondo.

5. **Nordia Asocio.** Ni sendas leteron al la Nordia Asocio pri la ekzisto de la komisiono kaj petas subvencion kaj subtenon por nia agado. same ni faras kun la Nordia Konsilantaro.

***Svedaj radio kaj televido***

Post la bona efiko de la radioprogramo fine de 1988, ni pli intense kontaktas la radion kaj la televidon, proponante kursojn, informoprogramojn ktp.

***Ekspozicioj kaj foiroj***

Se necese, SEF subtenas lokajn klubojn en la partopreno de ekspozicioj kaj foiroj kun tutlanda intereso.

***Gazetaro***

SEF informas la gazetaron pri aktualaĵoj de la Esperantomovado 6–8 fojojn jare. Ni sendas la samajn informojn al la kluboj.

***Eŭropa komunumo kaj la sindikatoj***

Pro la intensaj kontaktoj inter Svedio kaj la eŭropa komunumo, SEF planas informi pri Esperanto al politikistoj kaj aliaj personoj, kiuj okupiĝas pri tiu demando. Same ni prilaboras sindikatojn, kiuj nuntempe agas pli kaj pli internacie.

***Prelegoj kaj turneoj***

SEF planas 2–3 turneojn kun spertaj esperantistoj el diversaj landoj. SEF informas la klubojn por ke multaj uzu tiun servon.

***Bibliotekoj***

SEF dissendas libroliston kun komentoj al la bibliotekoj kaj instigas eldonejojn de esperantaj libroj sendi ilin al Bibliotekstjänst. Kiam SEF dissendas specialnumerojn de La Espero, oni kunsendas leteron por instigi al abonado. SEF instigas

la membrojn prunti Esperanto-librojn en la loka biblioteko.

*La Espero*
La Espero n-ro 2, eldonota printempe 1989, temas speciale pri Esperanto en la evoluantaj landoj. La numero estos sendata al diversaj celgrupoj.

*Inform-materialo*
SEF eldonas libreton kun ideoj kaj sugestoj por fari variajn kaj interesajn programojn en la kluboj.

### C. Plifortigi la klubojn kaj plinombrigi la membraron

La klubaj kaj membraj aktivecoj estas la kondiĉo por progreso de Esperanto. Kelkaj kluboj tre bone laboras, aliaj pro diversaj kaŭzoj ne funkcias same bone. SEF aktive laboras por ke najbaraj kluboj kunlaboru kadre de diversaj programoj. SEF ankaŭ planas konkrete helpi kaj apogi malfortajn klubojn laŭ sia ebleco.

### Ĉ. Eldoni membrogazeton

Gravas eldoni membrogazeton, kun novaĵoj el la Esperantomondo kaj sciigoj pri tio, kio okazis – sed pli grave, pri tio, kio okazos. SEF eldonas ses numerojn jare ek de 1987, kiam ni perdis la ŝtatan subvencion al la gazeto.

### D. Apogi SEJU-n en junulara Esperantolaboro

Ni havas relative fortan junularan organizon. Sed ĝiaj membroj koncentriĝas ĉefe en kelkaj lokoj. SEF volas kunhelpi al plia disvastigo de Esperanto inter gejunuloj en cetera Svedio. SEF admonas la klubojn speciale atenti la gejunulojn kaj rekomendas starigi vojaĝstipendion por gejunuloj. SEF ankaŭ volas evoluigi la kunlaboron kun SEJU.

### E. Kunlabori kun aliaj Esperanto-organizaĵoj en Svedio

Gravas ankaŭ, ke SEF kunlaboras kun aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj fakaj societoj en Svedio. Kadre de tiu kunlaboro ni povus atingi pli multajn celgrupojn.

### F. Plifortigi la ekonomion

Dank' al la donacemo de la membroj kaj kluboj kaj pli malmultekosta membrogazeto, nia ekonomio nun estas pli bona ol antaŭ unu jaro. Sed ĉar la kostoj ĉiam altiĝas kaj la enspezoj povas varii de jaro al jaro, estas necese daŭre peti subtenon de diversaj fondusoj (kvankam la rezultoj ĝis nun estis negativaj) kaj ŝtatan subvencion.

Ĉar la loterio tiel glate funkciis dank' al la entuziasma kaj ideriĉa aranĝanto, SEF planas novan loterion kiel eble plej baldaŭ. SEF ankaŭ agas pli aktive por varbi anoncantojn en *La Espero* kaj esperas, ke la membroj volas kunhelpi.

**EL LA AGADRAPORTO**

# Finvortoj pri 1988

Sube vi povas legi la finvortojn de la jarraporto, kiuj estas resumo de ĝi. Vi ankaŭ povas informiĝi pri nia ekonomia stato dum 1988. Grave estas, ke vi tralegu la agadplanon por 1989 kaj 1990. Ĝi koncernas ĉiujn esperantistojn, ĉar ni kune efektiviĝos ĝin.

## Finvortoj

La aktiveco dum 1988 estis same vigla kiel dum la jubilea jaro. Ŝajne homoj nun pli atentas pri Esperanto ol antaŭe. Al tio kontribuis speciale kelkaj okazintaĵoj aŭ aktivecoj.

La kluba informlaboro estas tre grava, kaj kelkaj kluboj faris modelan laboron tiurilate.

La kursoj en la popolaltlernejo de Karlskoga daŭre okazis, kun du oksemajnaj kursoj kaj unu somera kurso unusemajna. Tiuj kursoj estas bona propagandilo, kaj krom tio ankaŭ edukas instruistojn, kiujn ni ja tre bezonas.

Ni havis bonan kontakton kun la sveda UN-asocio. Ĝia prezidanto Karl-Erik Svartberg prelegis dum nia jarkongreso en Sundsvall. La kongreso de la sveda UN-asocio en Umeå traktis i.a. du proponojn pri Esperanto, kaj ambaŭ estis pozitive akceptitaj.

En la radio ni ekhavis okazon informi pri Esperanto dum kelkaj minutoj, kaj tiuj minutoj estis vere rezultodonaj. Post la programo multaj homoj petis pri informoj. Kvardek personoj ekstudis la korespondan kurson, kaj dek tuj membriĝis.

Fine de la jaro ni starigis nordian komisionon kun reprezentantoj el Danio, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio. La celo estas i.a. kunordigi nian eksteran informadon, kaj ni ĉiuj estas tre optimismaj pri nia kunlaboro.

Grava okazintaĵo eksterlande, kun ligo al Svedio, estas la plano krei internacian universitaton en Pekino kun Esperanto kiel la sola stud- kaj laborlingvo. La rektoro de la universitato de Uppsala, Martin H:son Holmdal, profesoro pri anestezologio, akceptis fariĝi unu el la tri rektoroj.

Membroj kaj kluboj estis tre kontribuemaj. SEF ricevis monhelpon pere de testamento, akcioj, lukontribuo kaj aliaj donacoj. Ni kore kaj sincere dankas al vi ĉiuj. Kaŭze de la atingitaj progresoj dum la jaro, kaj dank' al pli bona ekonomia situacio, estas grave kaj eble daŭrigi niajn strebadojn disvastigi Esperanton.

La estraro de SEF volas danki ĉiujn klubojn kaj unuopajn membrojn, kiuj kontribuis al la rezulto dum la jaro, kaj ni ankaŭ volas danki pro bona kunlaboro.

*Stokholmo la 18-an de februaro 1989*

**La estraro**

# Ekonomisk rapport för år 1988

## Inkomster

| | 1988 | 1987 |
|---|---|---|
| Medlemsavgifter | 98.262,— | 93.375,— |
| Klubo Cent | 5.000,— | 5.100,— |
| Klubo Cent Jaroj | — | 2.200,— |
| Esperanto-Främjandet | 440,— | 1.525,— |
| Gåvor | 43.127,57 | 25.867,— |
| La Espero, försäljning | 4.127,50 | 1.625,50 |
| La Espero, annonser | 1.477,50 | 150,— |
| Räntor, obl.vinster, kursvinster | 5.134,49 | 8.325,19 |
| Trycksaker | 235,— | 391,— |
| Kongressresa, egna arr. | — | 6.790,— |
| Bokauktioner | 2.332,— | 3.950,50 |
| Turnéer | — | 1.154,50 |
| Info-material, försäljning | 10.687,50 | 25.616,80 |
| Förmedlinsprovisioner | 17.780,74 | 24.184,26 |
| SEF-kongressen | 2.127,— | — |
| *1987 års underskott* | | *34.005,17* |
| | 190.731,30 | 234.439,97 |

## Utgifter

| | 1988 | 1987 |
|---|---|---|
| La Espero | 34.552,10 | 65.402,72 |
| Esperanto-Centro (hyra, el, etc.) | 49.837,30 | 48.935,13 |
| Porto | 10.065,20 | 10.562,40 |
| Verksamheten | 20.991,45 | 22.126,90 |
| SEJU | 9.500,— | 3.150,— |
| SEF-kongressen | — | 7.684,52 |
| Lön, netto efter AMS-bidrag | 910,10 | 8.797,50 |
| UEA-avgifter | 4.021,60 | 5.117,20 |
| Info, nytt material m.m. | 6.054,10 | 38.970,80 |
| Esperanto-Främjandet, folder | — | 3.143,— |
| Regionerna | 599,25 | 1.627,50 |
| Turnéer | 783,30 | — |
| Diverse utgifter | 4.745,50 | 10.540,30 |
| Avskrivningar | 18.511,— | 8.383,— |
| *1988 års överskott* | *30.160,40* | |
| | 190.731,30 | 234.439,97 |

# Balansräkning

## Tillgångar

| | |
|---|---|
| Inventarier | 11.920,— |
| Värdepapper | 35.548,70 |
| Postgiro, Sthlm | 31.416,96 |
| Postgiro, Malmö | 74.889,08 |
| Bank | 21.550,50 |
| Fordran på ESE | 23.922,73 |
| Diverse fordringar | 10.565,50 |
| Kontant | 5,70 |
| Fordran på specialkontot | 17.863,03 |
| | 227.682,20 |

## Skulder

| | |
|---|---|
| Skuld till UEA | 37.878,84 |
| Tidningsabonnemang | 22.345,91 |
| 1989 års medlemsavg. | 7.500,— |
| Klubo Cent 1989 | 800,— |
| Skatt | 1.400,— |
| La Esperos info-nr | 8.000,— |
| Specialkontot | 5.508,96 |
| R. Hjorths fond | 10.000,— |
| Eget kapital | 130.895,59 |
| | 227.682,20 |

## SEF:s flaggcentral

**För att stå till tjänst med utlåning av Esperanto-flaggor (ej bordsflaggor) vid kongresser, årsmöten, sommarkurser, seminarier, större Esperantosammanträden o.dyl. har SEF en flaggcentral i Malmö. Adressen är just nu: Lennart Magnusson, Poppelgatan 61, 213 62 Malmö, tel: 040/94 09 20. Där kan P.M. och förteckning erhållas. Utlåningen är kostnadsfri, förutom frakten. Beställning av flaggor skall alltid göras i god tid.**

HISTORIO

# Kiel Paŭlo Lengyel helpis d-ron K.B. Wiklund

Leginte la broŝuron titolitan **Lengyel Pál, Eszperantista Nyomdász** (Pál Lengyel, esperantista presisto) publikigitan en Szekszárd, Hungario, en 1986, mi rimarkis, ke mankas en ĝi mallonga sed interesa ĉapitro en la vivhistorio de tiu elstara hungara esperantisto.

Ni retroiru 88 jarojn en la historion de Esperanto en du landoj, Svedio kaj Hungario. En 1900 ĉe la universitato de Upsalo en Svedio, d-ro Karl Bernhard Wiklund oficis kiel docento pri finnugra lingvistiko. Li estis la instruisto de Björn Collinder, kiu en postaj jaroj fariĝis eminenta finnugristo kaj ankaŭ esperantisto.

Docento Wiklund planis starigi kurson pri la hungara lingvo en sia universitato, sed li havis malfacilaĵojn, ĉar en Svedio ne estis havebla fakliteraturo pri la hungara lingvo. Li, do, skribis leterojn en la hungara, germana kaj franca lingvoj al diversaj librovendistoj en Hungario, sed post duonjaro li ne ricevis respondojn, kaj ankoraŭ mankis la libroj por lia kurso.

D-ro Wiklund parolis pri tiu problemo kun sia samurbano, Paul Nylén, kiu estis profesia ĵurnalisto kaj pioniro de la Esperantomovado en Svedio. Li certigis al Wiklund, ke akiro de la koncernaj libroj estos simpla afero per la helpo de Esperanto.

Nylén tuj ekskribis al Paŭlo Lengyel en Szekszárd, informante lin pri la libroj bezonataj de la sveda klerulo. Lengyel trovis la verkojn kaj sendis ilin al d-ro Wiklund, kiu poste povis sukcese organizi la kurson pri la hungara lingvo. D-ro Wiklund, konvinkite pri la utilo de Esperanto, rakontis al siaj lernantoj, kiel lia problemo estis solvita kaj rekomendis al ili la lernadon de Esperanto.

En la mallonga artikolo titolita "Nur Esperanto helpis!", kiun Paul Nylén aperigis en Lingvo Internacia, li informis, ke la librojn sendis esperantisto en "Szegzárd", sed ne mencias la nomon Paŭlo Lengyel.

Bernard Golden

NEKROLOGO

# Bertil Åkerberg mortis, 76-jara



Meze de majo 1989 mortis Bertil Åkerberg, Stockholm, la respondeca eldonanto de La Espero. Li estis 76-jara.

Profesie li laboris en la sveda poŝto kaj li esperantiĝis 1934. Jam post kvar jaroj li estis sekretario de la esperantistagrupo en Stockholm, poste dum multaj jaroj ĝia kasisto kaj ankaŭ estrarano de SEF. Kiel pensiulo li deĵoris en Esperanto-Centro kaj estis la plej grava persono en la laboro pri ekspedo de La Espero.

De 1985 Bertil estis honora membro de SEF, kaj en 1988 la pacasocio de Stockholm honoris lin per la lingvopremio de Josefina Larsson. Li restas ĉe ni en tre bela memoro.

I.N.


## Ang. frimärken

**Numera får man som bekant behålla frankeringen som finns på paketavier, om man säger till på posten. Där finns ofta ovanliga frimärken.**

**Vi tar emot använda frimärken, utländska och främst svenska (även julfrimärken o.dyl.). Allt går till UEA som en gåva från de svenska esperantisterna. Sänd själv eller samla ihop inom föreningen. Här i Sverige samlas allt hos Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö, f.v.b. till UEA som riktat ett stort tack till Sveriges samlare under år 1988. Vi kan fortsätta.**

# Nova Verdstela Internacia Universitato

*(diskutata)*

**I. Celoj:** por krei tute novan malferman internacian universitaton, mobilizi instruan forton; diskonigi sciojn pri scienco, tekniko kaj apliki avangardajn teknikojn, altigi sciencan kaj kulturan kvaliton de la tuta nacio, akceli internacian scienteknikan kaj kulturan interŝanĝon, akceli amikecon inter popoloj de diversaj landoj kaj defendi la mondpacon.

**II. Kunlaborantoj:** la Ĉina Akademio de Sciencoj, Uppsala Universitato en Svedio, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, Internacia Scienca Akademio Comenius, kaj aliaj famaj universitatoj kaj sciencesploraj instancoj en- kaj eksterlandaj.

**III. Studfakoj** (konsentitaj kaj disvastigoteblaj):

1. *naturaj sciencoj:* media protekto, katastrofa preventado, bioteknikoj, genetik-inĝenierarto;
2. *teknikaj sciencoj:* elektroniko, komputiko;
3. *administra scienco:* administrado de entreprenoj, ekonomio kaj administra sistemo;
4. *instituto de agrikulturaj ekonomiko kaj teknologio:* fakultato de ekonomia kaj teknika administrado, eko-inĝenierarta fakultato, komerca fakultato;
5. *humanismo;* lingvoj (Esperanto, ĉina kaj fremdaj lingvoj) eduko;
6. *orienta medicino:* la ĉina medicino, ĉinaj drogherboj, akupunkturo kaj mokso, masaĝo, ĉjigong (spirtekniko), kuracaj manĝaĵoj, luktarto, geriatrio;
7. *ĉinaj kulturo kaj arto:* ĉinstila pentrarto, skulpturo, metiarto, kaligrafio;
8. *manĝaĵa scienco:* nutrologio, kuirarto.

**IV. Eduka sistemo:** 4 jarojn por la normala kurso; 2 jarojn por kolegio; 1 monaton, 3 monatojn, duonjaron aŭ 1 jaron por mallongtempaj kursoj.

**V. Lernejo:** la ĝenerala oficejo de VIU estos en Pekino kaj ĝiaj institutoj kaj fakultatoj en koncernaj universitatoj en- kaj eksterlandaj.

**VI. Instruistoj:** engaĝi profesorojn, specialistojn, erudiciulojn de famekonataj universitatoj, institutoj kaj entreprenoj en- kaj eksterlandaj kiel profesiajn aŭ kumulajn instruistojn de VIU.

**VII. Laborlingvoj:** Esperanto kiel la unua laborlingvo, aldone ankaŭ la ĉina lingvo, angla kaj aliaj nacilingvoj.

**VIII. Monrimedoj:** kolektado, mempreparado kaj enspezo de VIU mem.

**IX. Lernantoj kaj aranĝo post ilia studo:**
Ili plejparte kiel daŭraj edukatoj venos el entreprenoj en- kaj eksterlandaj kaj revenos al tiuj entreprenoj post sia studado.

La ĉinaj studentoj povos daŭre studi en eksterlandoj pli-malpli ol unu jaron post 2–3-jara enlanda studado, kaj eksterlandaj studentoj povos daŭre studi en Ĉinio post sia enlanda studado.

**X. Diplomo:** la diplomo estos disdonita de VIU aŭ alilandaj universitatoj koncernaj, aŭ kune donita de ili.

**XI. Gvidantaro de VIU:** la universitata direkcio konsistos el reprezentantoj de partoprenantoj en VIU, kaj la direktoron kaj honordirektoron de VIU prenos sur sin famaj sciencistoj aŭ sociaj famuloj.

## Donacoj

| | |
|---|---|
| C.G. Ingestedt, Vällingby | 300 |
| Harry Nordlöf, Johanneshov | 500 |
| Skellefteå Esperantoklubb | 2 000 |
| Gunnar Larsson, Stockholm (memore al Karl Gustavsson) | 100 |
| Aina Grane, Stockholm | 115 |

## Klubo Cent

| | |
|---|---|
| Alice och Nils Johansson, Norrköping | 200 |
| Gunnar Birgersson, Stockholm | 100 |
| Tore och Signhild Johansson, Kalmar | 200 |
| Anna Eriksson, Sundsvall | 100 |
| Hässleholms Esperantoklubb | 100 |
| Hillevi Zachrisson, Linköping | 100 |
| Åke Palm, Malmö | 100 |

*Koran dankon por la donacoj! Pliaj donacoj estas bonvenaj al la poŝtĝiro de SEF, 20 12 – 3.*

# *Letero de Academia Sinica*

(Ni represas la leteron laŭ ĝia originala lingvaĵo)

*Beijing, 18. Apr. 1989*

*Estimataj gesinjoroj,*

*Ni jam ricevis viajn leterojn de longe. Al vi pardonon pro nia malfrua respondo kaj koran dankon pro via varma subteno por la fondiĝo de Internacia Scienca Esperanta Universitato (nun nomata Verdstela Internacia Universitato, VIU). Ni klopodas aktive kaj pene preni ĉiuflankajn preparlaborojn.*

*Post ĉiel ajn traktado, pri kelkaj el estraro de supermenciita universitato, oni faras jenajn decidojn: Honora Rektoro: Lu Jiaxi (fame konata kemiisto, membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, ĈAS, Prezidanto de la Prezidantaro de ĈAS, Vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, ĈPPIK, kaj Honora Prezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, STEA, sub ĈAS); Rektoroj: Wang Fusong (fame konata kemiisto, nuntempa Vicprezidanto de ĈAS, membro de ĈPPIK), Martin Holmdahl (Rektoro de la universitato de Uppsala, Svedio); Vicrektoro: Christer Kiselman (fame konata matematikisto, estro kaj profesoro de la Matematika Instituto de Universitato de Uppsala, Svedio, Ĝenerala Sekretario de Internacia Scienca Akademio Comenius, Vicprezidanto de Internacia Scienco-Asocio de Esperantistoj), k.a.*

*Ni vin bonvenas, ke vi faras gravan kontribuon por la fondiĝo de la Internacia Universitato, kiu favoras al Esperanta afero. Ni petas kaj proponas jene:*

*1. Trakti negocon kun viaj universitataj aŭtoritatoj por ke la universitato funkciiĝos en la kunlaboro. Se la aŭtoritatoj aprobas, sendu al ni la konfirman dokumenton formale subskribitan de la estroj de via universitato;*

*2. La universitato, aprobinta kunlaboron, esprimas siajn firmajn konvinkojn ke ĝi povas disdoni siajn diplomojn al la studentoj de nia universitato;*

*3. Vi ekrilatu al koncernaj entreprenoj kaj fondusaj organizaĵoj por ke ili finance subtenos nian universitaton;*

*4. La profesoroj kaj docentoj, kiuj lekcios en Ĉinio klopodi sin financi la elspezon por vojaĝo, loĝejo kaj manĝaĵo al Ĉinio kaj ricevos lekcia-honorarion de la Internacia Universitato;*

*5. Helpi varbi studentojn kaj doni lecionon ekde ĉi aŭtuno; la unuaj fakoj kaj kursoj ĉefe estas: la objektoj urĝe bezonataj en- kaj eksterlande kiel komence, de administrado, administrado pri entrepreno, administrado pri ekonomio kaj teknologio, ekologa konstruo, agrikulturaj ekonomiko kaj teknologio, elektronika kaj komputika aplikado, komerco, akupunkturo, kuirado, nova komputor-tekniko multfunkcia por disponigi dokumenton, Esperanto, ĉinlingvo kaj aliaj lingvoj; rilate al funkciigotaj fakoj kaj kursoj, ni [illegible] viajn opiniojn;*

*6. La Studadsesio okazos en Beijing de la 20-a ĝis la 26-a fare de Akademio Internacia de Sciencoj Sanmarino kun Ĉina Akademio de Sciencoj; dume oni funkciigos fakajn kursojn, kiuj estos la komenco de la kunlaboro inter la du akademioj; ni bonvenas vin ĝin partopreni kaj informu al ni la titolon de via lekcio kaj prelego kun viaj mallonga biografio kaj foto.*

*Elkoran dankon al vi pro viaj ege kontribuontaj subtenoj kaj helpoj.*

*Ni esperas ke vi povos rekomendi studi interesatajn fakajn lecionojn en Ĉinio, individue aŭ en grupo.*

*Sincere via,*


| | |
|---|---|
| *Wang Yuchun* | *Shen Chenru* |
| *Ĝenerala Sekretario* | *Vicprezidanto* |

*Esperanto-Asocio, Academia Sinica, 52 Sanlihe, 100864, Beijing, Ĉinio*

## Barn- och ungdomsträff i Närke i oktober

För första gången på länge anordnar nu SEJU en träff speciellt för barn och ungdomar under 18 år. Platsen blir Östansjö utanför Hallsberg, där det finns en barngrupp sen länge som läst esperanto.

På programmet kommer att finnas kurser på olika nivåer, alltefter deltagarnas behov, lekar, sånger och eventuellt teater. Lärare är sådana som är vana vid barnundervisning och annan ungdomsverksamhet, bl a Sven Jonsson, som även i andra sammanhang lett esperantokurser.

Målet är, bl a, att barn till esperantister som kanske saknar jämnåriga i sin klubb ska få en chans att träffa andra barn och ungdomar som vill lära sig esperanto.

Lokalen är en skola med tillgång till kök och klassrum. Vi sover i en gymnastiksal där det också finns duschar. Föräldrar är självklart välkomna att följa med, men vi kan bara erbjuda sovplats på golvet, så madrass/liggunderlägg och sovsäck får man ta med.

Färdbeskrivning skickar vi efter anmälan som görs genom inbetalning till SEJUs postgiro 513301–2.

Priser: SEJU-medlemmar under 21 år 150 kr, övriga 200 kr (barn och ungdomar blir automatiskt medlemmar i SEJU genom den högre avgiften).

För närmare upplysningar ring:
**Camilla Persson,**
**tel. 011 – 153889, eller**
**Berit Posthuma,**
**tel. 0753 –33928.**

## Drottning Silvia

blev i nyhetsprogrammet i TV 1 den 14 april kl. 21.00 intervjuad på engelska vid sitt besök på en dövskola i USA. Hon sade där att hon hade mycket svårt att förstå det amerikanska teckenspråket och att hon kände ett starkt behov av ett döv-esperanto som kunde förstås av alla teckenspråksanvändare oavsett från vilket land de kom. Det var säkert någon eller några miljoner tittare som såg detta inslag bara i norden och antagligen sändes intervjun med henne även i USA.

**Ivar Nilsson**


# TACK

till alla lottköpare av "Espero 88" och ett särskilt tack till de som inte tagit ut sina vinster (outtaget 3240:–).

# "ESPERO 89"

**LIKADAN VINSTPLAN**
**SAMMA LOTTPRIS**
**SOM FÖREGÅENDE**
**LOTTERI**

Säljstart den 1 september.

Tänk till och sälj på Esperantodagen den 2 september.
Anmäl ditt och klubbens förhandsintresse –
sänd ett vykort och tala om ditt behov till

"Espero 89", Box 80,
682 01 Filipstad

## 16-semajnaj kursoj en norvega popolaltlernejo

La popolaltlernejo en Nordöre ekster Tronheim en Norvegio arangos 16-semajnajn kursojn de Esperanto dum 1989. Ili intencas havi iun eksterlandan instruiston kiel helpinstruiston. Ĉefa respondeculo por la instruado estos Kirsti Fossgård, bonkonata por la partoprenintoj de la Esperantokursoj en Nordia en Kungälv, kie ŝi dufoje partoprenis por plibonigi siajn sciojn de Esperanto.

La adreso de la lernejo estas:
**Nordmöre Folkehögskule,**
**N–6650 Surnadal,**
**tel: 073/61922.**

**Märtha Andreasson**

## Fabela filmo el Pollando

Pola Esperanto-Asocio komencas, kunlabore kun pola sonografia entrepreno "Polskie Nagrania", unuhoran fabelan filmon surbaze de la novelo de Aleksander Puŝkin sub titolo "La neĝa blovado".

La novelo, verkita de unu el la plej famaj rusaj verkistoj – A. Puŝkin kaj tradukita de Antoni Grabowski – estas nostalgie-sataneska rakonto pri perfideco de la homa sorto, dependanta de senĉesaj – ofte rekte demonaj koincidoj. Neĝblovado ĵetas sorton kaj vivon de la herooj al senfinaĵoj de vojoj kaj senvojoj. La scenaro de la rakonto koncernas la 19an jarcenton kaj precize spegulas la etoson de la epoko.

La filmo estos realigita en Betacam-videotekniko. Pro planata tre alta valoro de la bildo, ni antaŭvidas relative altajn realigkostojn (i.a. pro plureco de rolantoj, scenejaranĝo ktp).

Pro tio la antaŭvidata kosto de la kasedo estos ĉ. 30 – 40 usonaj dolaroj.

Informoj kaj mendo ĉe
**Pola Esperanto-Asocio,**
**Krucza 38/42**
**PL-00-512 Warszawa,**
**Pollando.**

## Bonvenon al Latvio

Latvia Esperanto-Asocio havas ĉ. 20 Esperanto-klubojn kun 200–300 aktivaj membroj. Ili esperas perletere kaj persone kunlabori kun svedaj esperantistoj. Estas du eblecoj:

1. Senvaluta interŝanĝo de 3- aŭ 5-personaj grupetoj ĝis 10 tagoj. Uzante senvalutan interŝanĝon, la invitantoj garantias loĝadon, manĝojn, programon kaj poŝmonon. En tiu laboro subtenas Latvia societo de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando.

2. Ni povas sendi unu al la alia oficialajn individuajn invitojn kaj tiel viziti unu la alian. Uzante tiun inviton, latvoj rajtas ŝanĝi monon por restado eksterlande.

Se vi skribas tien, necesas atenti, ke leteroj kutime vojaĝas 3–4 semajnojn, tiel respondon eblas ricevi nur post ĉ. 2 monatoj. Skribu por detaloj al:
**M. Jakobsons,**
**str. Lenina 84–5,**
**SU–226001 Riga 1.**

## Konkursa alvoko

Monda turismo invitas al konkurso pri la temo "Esperanto-turismo retrospektive". Ili volas kolekti laŭeble ĉiujn dokumentojn sur la temo de turismo per Esperanto dum la unua jarcento.

Por verki la centjaran historion de Esperanto-turismo, ili alvokas ĉiujn esperantistojn serĉi inter siaj esperantaĵoj materialojn, kiel: Gazeteltondaĵoj, broŝuroj, insignoj, afiŝoj, citaĵoj el libroj (kun indikoj pri titolo, aŭtoro kaj eldondato) kaj alispecaj raportoj pri Esperanto-turismo.

Inter la plej valoraj kontribuintoj ili disdonos premiojn: Unusemajnan senpagan partoprenon en Esperanto-aranĝoj dum la jaro 1990 en Benelukso, Hungario aŭ Pollando, aŭ libro-donacon.

La konkursaĵojn akceptas ĝis la 30-a de aŭgusto 1989:
**S-ino Elizabeta Pallos,**
**Pecs, Ybl M.u.9.1/2,**
**H–7633, Hungario**

La prijuĝo de premioj okazos dum la 15-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo la 25-an ĝis 30-a de septembro 1989.

## Invito al Ustka

Kun la celo krei internaciajn grupojn por praktiki la esperantan lingvo-uzon, oni invitas eksterlandanojn kaj garantias senpagan loĝadon en 2- aŭ 4-litaj ĉambroj en la konata ripozloko ĉe la Balta maro, Ustka. Skribu aŭ telefonu al:
**Kazimierz Osóbka,**
**ul. Willow 10,**
**PL–76–270 Ustka,**
**tel: 145–473.**

La restado daŭros dum du semajnoj kaj oni ofertas agrablan etoson en milda mara klimato, ekspoziciojn, ekskursojn, bonan manĝon.

## Someraj Tagoj

FEJO, la finnlanda junularo, invitas al someraj tagoj en Mariehamn, Åland, la 30-an de junio ĝis la 2-a de julio.

Oni dormos en 3- aŭ 4-personaj ĉambroj en la gastejo de Övernäsgården proksime al la maro. Junuloj malpli ol 26-jaraj pagos 250 FMK, aliaj 350 FMK.

Aliĝu al:
**Anna Ritamäki,**
**Petolavägen 6 B 36,**
**SF–20720 Åbo,**
**Tel: +358253146.**

POSTTIDNING

Sten SVENONIUS
Erikstorpsgatan 26 A
21754 MALMÖ

Esperantoförbundet
Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm

# Kontrolu vian adreson! Ĉu ĉio en ordo?

Per ĉi tiu numero de La Espero ni komencas uzi komputoron por adresigi la gazeton.

Dum pli ol dudek jaroj Bertil Åkerberg stampis la adresojn sur la gazeto per granda adresmaŝino. Li enmetis la metalajn plakojn unu post unu, kaj premis la adreson sur la gazeton aŭ, pli frue, sur koverton. Apud la adresmaŝino li havis alian aparaton, per kiu li povis fari novajn adresplakojn por novaj membroj, aŭ ŝanĝi adresojn. Bertil ankaŭ zorgis, ke ĉiuj adresoj estu absolute korektaj.

Por la raportoj de la klubaj kasistoj ni havis dum la lastaj kvin jaroj alian sistemon de adresoj, nome komputoron. Per tiu aparato eblus elskribi etikedojn, sed je relative alta kosto de farbobendoj.

Ambaŭ sistemoj estis malnovaj. Bertil Åkerberg atentigis plurfoje, ke lia maŝino por skribi novajn adresplakojn estos baldaŭ foruzita. La komputoro en EsperantoCentro estis konstruita antaŭ pli ol dek jaroj, kio estas alta aĝo por komputoro. En aprilo ni faris decidon ekuzi pli modernan malgrandan komputorsistemon kaj ni komencis esplori, kiel eblos transmeti al registron de unu sistemo al alia. Bertil Åkerberg promesis helpi ankaŭ pri la nova sistemo. Ni planis ekuzi la novan sistemon en la malfrua aŭtuno, antaŭ ol la laboro por la nova jaro komenciĝos.

Kiel vi povas legi en alia loko en la gazeto, Bertil subite mortis en majo, kaj necesis rapide solvi la adresproblemon. Ni sukcesis trovi firmaon, kiu kopiis la enhavon de 8-cola disketo al pli moderna formato, sed la interspacoj inter la diversaj "kampoj" ne kopiiĝis, tiel ke la stratnumero, naskiĝjaro kaj la telefonnumero troviĝis kune. Post multe da laboro kaj multaj kontroloj nun eblas uzi tiun sistemon. Se vi tamen trovas eraron en via adreso, bonvolu informi pri tio!

**Ulla Luin**

# Esperanto en la radio!

**Esperanto en la radio estas revo, kiu eble baldaŭ realiĝos.**

Erik Svärd el Malmö informis min pri sukcesa kurso en la franca radio Inter, pri kiu li legis en iu Esperanto-gazeto. Mi prunteprenis tiun kurson de Francio kun intenco montri ĝin por la sveda edukradio.

La 14-an de aprilo mi kaj Lars Forsman vizitis la ĉefon de la edukradio, Rolf Horneij, por informi lin pri Esperanto kaj diskuti kun li pri Esperantokurso en la radio.

Post preskaŭ duhora vigla kaj intensa diskuto en pozitiva etozo, Rolf Horneij estis preta proponi al siaj kunlaborantoj serion de programoj pri la lingvo Esperanto en la radio kaj eble ankaŭ programeton en la televido. Se ankaŭ ili estos pozitivaj, li enkalkulos tiun serion en la budĝeton por 1991.

Kiam Lars kaj mi forlasis la edukradion, ni sentis grandan kontenton kaj optimismon kaj tuj komencis plani por tiu programo en la radio – ĉar tiel firme ni perceptis lian pozitivan promeson.

**Karin Lindquist**


# "La Librobindisto"

I samband med 100-årsjubileet av Esperantorörelsen i Sverige har det nu startats en firma under namnet La Librobindisto-Bokbinderiservice som åtar sig att binda in hela tidskriftsårgångar och böcker. Gamla ordböcker t ex blir som nya. Även andra böcker och tidningar bindes. Ring eller skriv och begär offert.

*La Librobindisto-Bokbinderiservice, Box 14051, 250 14 Helsingborg 14, tel: 042/15 59 69.*